



41a jaro. Nro 94a. 2a semestro 2014

VENEZUELA STELO

Organo de Venezuela Esperanto-Asocio

ISSN 1316-0451

99-a Universala Kongreso de Esperanto en Bonaero!



**Pri la Universala Kongreso fotoraportas
Ricardo Coutinho kaj Liba Gabalda**

**La 22-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo
kaj la 47-a ILEI-Konferenco en Montevideo**

Pino D'Angiò: La pluvombrelo



Enhavtabelo

Noticias en español 3

Mark Fettes: Aliĝo al UEA utilas! Aliĝo helpas! 4a

UEA: Más de 5000 seguidores en Facebook 5

«FUTBALI AŬ NE FUTBALI, JEN STARAS LA DEMANDO»

Johano Negrete 6a

La 22-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo, Salou

Liba Gabalda 8a

La 99-a Universala Kongreso de Esperanto

Ricardo Coutinho 10a

La 99-a Universala Kongreso de Esperanto

Liba Gabalda 19a

La 47-a ILEI-Konferenco en Montevideo

Liba Gabalda 21a

Tibor Sekelj: Pri orkideoj 23a

Forpasoj 24a

Pino D'Angiò: La pluvombrelo

El la itala esperantigis: Andrés Turrisi 25a

Directorio de Asociaciones en América 26

Esperanto: Movimiento internacional 27



VENEZUELA STELO
Organo de la Venezuela Esperanto-Asocio

VENEZUELA STELO

Apartado postal 47675, Caracas 1041-A.

Telefonnumero: 58-0212.662.9224

www.esperanto-venezuela.org

venesperanto@cantv.net



AVE
Asociación Venezolana de Esperanto
Venezuela Esperanto-Asocio

Estraranoj:

Prezidanto

Ricardo Coutinho.

Vic-Prezidanto

Juan Miranda.

Ĝenerala Sekretario

Thairon Martínez.

Kasistino

Elizabeth Garzón.

Aldelegito pri Biblioteko

José G. Cisneros.

**Aldelegito pri Konferenco kaj Inter-
instituciaj Rilatoj**

Esteban Mosonyi.

Aldelegito pri Instruo

Juan Negrete.

Grafikisto

Ramón Morales Castel.

¿Quieres saber más sobre el Esperanto?

El Esperanto es un idioma planificado, creado en 1887 para servir como idioma neutral internacional. Su gramática sencilla facilita su dominio rápido. Su flexibilidad lo convierte en una lengua ideal para la traducción y la creación literaria. Si quieres saber más sobre este idioma fascinante, escribe o dirígete a la **Asociación Venezolana de Esperanto**.

Venezuela Stelo es el órgano difusor oficial de la **Asociación Venezolana de Esperanto**. Esta revista está escrita en esperanto, conteniendo artículos de interés nacional e internacional.

Para saber más visita: www.esperanto-venezuela.org

Y también el Directorio en las páginas 26 y 27 de este número.

Pri la enhavo de niaj artikoloj repondekas iliaj aŭtoroj. Manke de indiko de la aŭtoro, repondekas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligas al ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborantojn.



Fundación Grabowski otorga premio a Marjorie Boulton

En el acto de cierre del 99 Congreso Universal de Esperanto en Buenos Aires, Argentina, se anunció la decisión de la Fundación Grabowski de otorgar un premio a la eminente escritora Marjorie Boulton, quien en mayo celebró su 90 cumpleaños. La Fundación Grabowski de UEA fue creada hace 30 años por la donación del esperantista polaco-venezolano Adam Grabowski para apoyar la cultura esperantista mundial por medio de premios y subvenciones, principalmente por la literatura original y traducida. La comisión de jueces está constituida por Ulrich Lins (Alemania), István Ertl (Luxemburgo) y Shi Chengtai (China).



El premio consiste en una cantidad de 1150 dólares estadounidenses. Marjorie Boulton recibe este premio como reconocimiento por su obra de toda la vida, que incluye muchas obras superiores de la literatura en esperanto como por ejemplo su poemario *Kontralte, Eroj kaj aliaj poemoj, Rimleteroj* (con William Auld) y *Du el* (con Poul Throsen); sus historias cortas *Okuloj*; la colección dramática *Virino ĉe la landlimo*; la biografía *Zamenhof*, autor del esperanto; el estudio literario-biográfico *Poeto fajrokora: la verkaro de Julio Baghy*; y el popular libro de texto para avanzar en el dominio del esperanto *Faktoj kaj fantazioj*.

Marjorie Boulton es miembro de la *Akademio de Esperanto* (Academia de Esperanto) y Miembro Honorario de la *Akademio Literatura de Esperanto* (Academia Literaria de Esperanto).

Fuente del texto y de la imagen: [Gazetaraj Komunikoj de UEA.](#)

Premio Deguĉi otorgado a Stano Marček

El Premio Onisaburo Deguĉi, “el premio esperantista de la paz”, fue iniciado gracias a una donación de Oomoto en 1987 y es otorgado cada año. El premio consiste en un diploma y una cantidad de 2000 euros.

Según sus reglas, el Premio Deguĉi es otorgado por méritos en la utilización del idioma esperanto como recurso para la paz mundial y felicidad de la humanidad, conforme al ideal del Doctor Zamenhof y a las enseñanzas de Onisaburo Deguĉi, y por contribución a la meta de UEA de hacer crecer entre sus miembros un fuerte sentimiento de solidaridad y de desarrollar en ellos la comprensión y la estima por otros pueblos.

Por medio de la decisión de la junta directiva de UEA, el Premio Deguĉi del año 2014 es otorgado al señor Stano Marček de Eslovaquia, por su larga labor como profesor de esperanto en muchos países y por su labor periodística como editor de muchas revistas en idioma esperanto.



Fuente del texto y de la imagen: [Gazetaraj Komunikoj de UEA.](#)

Mark Fettes: Aliĝo al UEA utilas! Aliĝo helpas!

Kiam mi laboris en la Centra Oficejo de UEA en la okdekaj jaroj, ni havis inter sep mil kaj ok mil individuajn membrojn. Nun la membronombro ŝvebas ĉe la limo de kvin mil. Samtempe, tamen, Esperanto disfloras inter multaj junuloj tutmonde, kiuj danke al Interreto fariĝis aktivaj lernantoj kaj uzantoj de la lingvo; kaj ankaŭ mankas en nia vicoj multaj “veteranoj” de la movado. Nia membrovarba kampanjo celas do rekreskigi nian “rondon familian,” kiu praktike kaj simbole konsistigas la kernon de la Esperanto-movado mondscale.

Kial do aliĝi al UEA? Ekzistas multaj bonaj argumentoj por tio. Helpu nin disvastigu ilin—dum landaj kongresoj, ĉe lokaj grupoj, en revuoj, en Facebook, Lernu.net, radioprogramoj kaj en Esperanto-televido. Kaptu ĉiun okazon por menci, ke vi mem estas membro de UEA. Per via helpo, nia monda asocio povos rekapti la fortojn bezonatajn por fronti la defiojn de la 21^a jarcento!

Per aliĝo al UEA, **oni kontribuas al la tutmonda kresko de Esperanto**. Ĉiujare per siaj diversaj fondaĵoj UEA donas konkretan subtenon al asocioj kaj aktivuloj en Azio, en Afriko, en Ameriko; per tiu agado, nia komunumo fariĝas kulture pli kaj pli riĉa, bunta, inkluziva.

Per aliĝo al UEA, **oni plifortigas la voĉon de la lingvo kaj movado**. Estas ĉefe la reprezentantoj de UEA kiuj argumentas por la valoro kaj aktualeco de Esperanto ĉe UN kaj Unesko kaj en diversaj internaciaj forumoj. Tiu agado ankaŭ helpas krei kondiĉojn por sukcesa informado sur lokaj kaj landaj niveloj.

Per aliĝo al UEA, **oni subtenas instruadon de Esperanto kaj trejnadon de aktivuloj**. Interalie, la AMO-seminarioj de UEA donas rimedojn kaj okazojn por vastigi la konojn kaj kapablojn de homoj sur ĉiuj niveloj de la movado.

Per aliĝo de UEA, **oni esprimas solidarecon kun la mondvasta Esperanto-komunumo**. Ĉiujare UEA subtenas kulturajn projektojn diverslande, venigas homojn al kongresoj kaj seminarioj, kaj membrigas



junulojn el malriĉaj landoj por doni al ili senton de aparteno al la internacia komunumo. Ofte la dankmesaĝoj de tiaj junuloj al la CO estas ege kortuŝaj.

Kaj ni ne forgesu, ke **UEA-membreco ankaŭ donas personajn avantaĝojn**. Inter ili aparte menciindas forta rabato al Universalaj Kongresoj, 10%-a rabato en la Libroservo, kaj abono al la Gvidlibro aŭ Jarlibro kaj la revuo Esperanto, papere kaj rete. Por aktiva esperantisto, tiuj estas nemalhaveblaj rimedoj por partopreni en la movado en tutmonda skalo.

Ne mankas argumentoj. Ni disvastigu ilin! Farante tion, tamen ne forgesu pagi vian propran kotizon—eĉ ankoraŭ por la jaro 2014! Kaj pagante por la jaro 2015, la jaro de la 100^a Universala Kongreso, memoru samtempe pri la ekzisto de aliaj kategorioj per kiuj oni speciale povas subteni UEA, kiel Societo Zamenhof, Dumviva Membreco aŭ Patronoj de TEJO. Per donacoj al Fondaĵo Canuto vi povas subteni homojn el malriĉaj aŭ nepagipovaj landoj.

Ek al rekorda kresko de nia membraro en 2015!

Mark Fettes





Más de 5000 seguidores en la página de UEA en Facebook



El número de seguidores de la página de UEA en la red social *Facebook* superó los 5000 el 12 de diciembre de 2014. La página fue creada el 5 de noviembre de 2009.

Con 762 seguidores, Brasil sigue en el primer lugar, seguido con una gran distancia por Estados Unidos (433). Más de 100 seguidores están también en Francia (249), España (222), Italia (215), Polonia (211), México (161), Lituania (144), Alemania (142), Rusia (131), Argentina (130) y Hungría (114). Un salto notable en las estadísticas hizo Lituania, que en medio año pasó a Alemania y a Rusia. Respecto al resto, el orden de los países es el mismo desde hace tiempo.

En las estadísticas la ciudad de Rio de Janeiro tiene el primer lugar con 102 seguidores, mientras Vilno superó con 92 seguidores a Sao Paulo (78), que desde hace tiempo tenía el segundo lugar en Brasil. Sigue Budapest (55), Buenos Aires y París (52 c/u), Ciudad de México (44), Hanoy y Moscú (42 c/u), Brasilia y Madrid (37 c/u), Barcelona (36) y Londres, Roma y Varsovia (33 c/u).

La distribución por género sigue igual desde el comienzo: 71% de los seguidores son hombres y 28% mujeres (el género de un 1% de los seguidores se desconoce). La proporción de hombres es más grande aquí que entre los miembros individuales de UEA, de los cuales el 66% son hombres y el 30% mujeres (género de un 4% es desconocido).

La comunidad de seguidores de UEA en *Facebook* es muy joven. Uno de cada seis seguidores (17,5%) tiene menos de 25 años; mientras que entre los miembros individuales de la Asociación sólo uno de cada veinte (5,2%) es menor a 25 años. Un cuarto (24%) tiene entre 25 y 34 años (6,2%), 18% tiene entre 35 y 44 años (7,4%), 29% tiene entre 45 y 46 años (32%), y 11% tiene más de 64 años (39,8%). Debido a que entre los miembros individuales de la Asociación la edad de 9,3% no se conoce y en *Facebook* se trata sólo del 0,5%, la distribución de edades no es directamente comparable. Está claro, sin embargo, que la comunidad de UEA en *Facebook* es en promedio mucho más joven que los miembros que cotizan.

Fuente del texto y de la imagen: [Gazetaraj Komunikoj de UEA](#).

Shakespeare: «FUTBALI AŬ NE FUTBALI, JEN STARAS LA DEMANDO»

Johano Negrete

La komenca demando estas kial oni ŝatas futbalon? «Estas malfacile kompreni tiun preskaŭ tutmondan pasion el la vidpunkto de simpla sportumado. Laŭ mi la sekreto kuŝas en tio, ke futbalo estas pli ol ludo –ĝi estas religio*» Tion kaj pli, diras Jim Pigat, ekzemple, ke futbalo havas ĉion, kio religio bezonas: Diojn, profeton, festojn, celojn...La Dioj estas la fondintoj, la katedraloj estas la stadionoj, kaj la Sanktaj Militoj estas la matĉoj, la ĉielo signifas la venkon, la pokalojn, la titolojn; kaj la profetoj la futbalistoj mem. Ju pli granda la futbalisto, des pli granda la profeto. (Ekz. la granda Maradona, kvankam lin ne ŝatas Jim Pigat).

Vere, li prezentas imagan kaj interesan bildo pri futbalo kaj ekde la nuna situacio de tiu sporto, lia vidpunkto parte akceptindas, kvankam laŭmiaopinie nur la komparo kun la koncepto de religio. Sed ne ĉio agordas kun la veraj roluloj de tiu inmensa pasio, dominanta sur la tuta mondo kaj ne ĉio funde koincidas kun la aspekton de la afero.

Kion oni vidas ĉe la televidekrano, kun tiom da programoj pri futbalo? Oni vidas KIA, SONY, COCA COLA, GENERAL MOTORS, GENERAL ELECTRIC, TOYOTA kaj aliaj. Ili estas la financantaj povoj malantaŭ la spektaklo. Sed ne tiom “malantaŭ la spektaklo”, ĉar ili ankaŭ aperas sur la ekrano de la televida futbalejo. Kaj kiuj estas la promociantoj kaj la grandaj povoj, kiuj kunportas la spektaklon al ĉiuj partoj de la mondo? Ili estas la grandaj superpovoj de la amasa komunikado aŭ la hegemonio de amaskomunikilaj korporacioj: News Corporation, CBS Corporation, Bertelsmann, The Walt Disney Company, Time Warner Cable, Prisa, Fox News, kaj en Latinoameriko: Televisa, Grupo Clarin, O Globo, Grupo Cisneros, El Mercurio inter aliaj. Tiaj estas la veraj profitantoj kaj administrantoj de la “nova religio”, laŭ la esprimo de Jim Pigat. Kaj milionoj aŭ bilionoj da dolaroj, kiuj cirkulas favore al la internaciaj korporacioj konstituas la esencon, la kernon de la nuna futballudo, kun superfaciaj promesoj de feliĉo al fanatikuloj aŭ amatoroj de tiu sporto.

Aliflanke, kio estas hodiaŭ futbalteamoj? Ĉu vere sportkluboj aŭ sportteamoj? Ŝajnas ke ne tute, ĉar ili alproksimiĝas al komercaj entreprenoj, kie ludantoj estas aĉetitaj kaj venditaj kiel simplaj varoj en la internacia merkato de futbalo. Precize unu el la aktualaj temoj pri la laboro de altprofesiaj futbalistoj, kiuj gajnas sufiĉe por esti konsiderataj riĉuloj, estas la forta streĉo al kiuj ili submetiĝas inter unu kaj alia ĉampionado, kun grava risko fizike kaj psike en la longodaŭro. Nunece kaj pro merkato la tempo de aktiva futbalisto ne multe daŭras (pli malpli inter 30-40 jaraĝaj), ne egalas al normalaj profesioj, ne gravas se ili turniĝas postretiriĝe futbalkonistoj. La tempo gravas kaj premas ne nur ene de ĉiu futbalmatĉo, sed ankaŭ en la profesia vivo, ĉar futbalisto devas triumfi ekde de frue por akiri reliefon kaj kontraktojn.

Kompreneble, kiel futbala profesiulo, aparteni al iu ajn teamo signifas, ke li apartenas tuttempe, ke li estas membro de malferma sekto, kun ĉiuj ties sekvantuloj, fervoruloj aŭ zelotoj, por ne paroli pri huliganoj. Ĉiuj

membroj en ŝajna sekto, kies grandaj manaĝeroj de naciaj kaj internaciaj eventoj estas la cititaj korporacioj aŭ grandaj ekonomike mondaj povuloj. Nur pro tio, oni devas jam suspekti.

Futbalsporto jam akiris internacian solidan strukturon, kaj regas per gravaj amaskomunikiloj, kie multaj “sacerdotoj” oficas entuziasme. Tiusence, ĉio ĉi, kies fina celo, almenaŭ laŭ ŝajno, aspekto aŭ eksteraĵo, ne estas la ekonomika nek politika rekompenco, sed konsistas en iu speco de spirita stato de feliĉo aŭ de sin ŝato, aŭ eble ŝajna spirita sano, kiu kompenci ĉiuj futbaloferoj, kiel en la konataj religioj: la savo.

Dum juneco mi multe ludis futbalon, certe kiel la plejmulto de infanoj kaj junuloj en mia maskiĝourbo, kaj ekde la dekdua aĝo jam ekludis en formalaj ĉampionadoj, kaj eĉ poste en profesia teamo. Sed mi ĉiam luktis por ne turniĝi stultulo, brutulo aŭ brutala futbalfanatikulo, al kiu la mondo ne gravas pli ol unu tago de grandemocia futbalmatĉo. Io simile estas tute komprenebla kiel pasio de infanaj aŭ junulaj jaroj, sed ne ŝajnas al mi logike aŭ racie, ke multaj jaroj pasis kaj la sama homo, jam matura adulto, ankoraŭ suferas je la sama viruso: tio estas, la ekskludanta futbalspasio. La proverbo diras “Ne bezonas la kapon konsilon de kruroj”, sed la fanatikulo renversas ĝin kiel “Ne bezonas la kruroj konsilon de kapo”. Se iu demandus min, kial mi jam delonge forlasis malataŭnen la futbalspasion, la korekta respondo estus: ĉar mi jam vivis sufiĉe da jaroj por kompreni la aferon.

Oni eĉ sin demandas ĉu tiu pasio estas tiom forta, tiom ekskludanta, kiel aliaj gravaj vivpasioj; ekzemple, enamiĝo, sekso, amo, riĉeco, famo, povo, laboreco, dioservo, inter aliaj. Kaj la respondo jesas: ĝi estas ekskludanta. Multaj virinoj ĉiulande plendas, ke iliaj edzoj ne “sufiĉe taŭge” plenumas siajn geedzajn devojn kaŭze de la futbalspasio. Do, jam delonge studuloj aplikiĝis analizi tiun ekskludeman pasion favore aŭ malfavore. Ni en alia artikolo daŭrigos en la sama laboro.

Estas normale ke en ne malmultaj kazoj de la futbala lingvaĵo oni trovas diversajn vortojn por la pozicio aŭ lokoj de la ludkampo. Do, en la esperanta oni povas ankaŭ trovi plurajn vortojn por la sama ideo, kaj tio dependas de la internacieco de futbalo, disemita tra la plej multo de landoj kaj kulturoj.

VORTOLISTO

piedpilko = futbalo
piedpilkludo
futbalmatĉo
futbalklubo
matĉo
golo
golejo
pafi golon

futbalsezono =temporada de futbol.
gajni per kvar goloj kontraŭ du

*Jim Pigat: *Tiu nekonata fenomeno*, en (Futbala) Heroldo de Esperanto, 30 novembro de 1998 (Numero 13 (1960)), p.4

**«FUTBALI AŬ NE FUTBALI, JEN STARAS LA DEMANDO» Johano Negrete**

Italio venkas Brazilo.

fajfi = silbar, tocar el cpito.

faŭli = cometer falta. (fari faŭlon)

defendanto = ariero (posto, tie de post')

arier' o (= NPIV : la malantaŭa parto de armeo, taĉmento kaj simile (retaguardia)

ariulo = tiu, kiu en futbalo apartenas al la tria linio de la teamo; en aliaj sportoj (rugbeo, hokeo, naĝpilko, k.s.), kiu pozicias kutime plej malproksime de la kontraŭa teamo.

ariergardo = taĉmente, kiu ŝirmas la malantaŭa parto de marŝanta armeo.

avan'o = la antaŭa parto de armeo, taĉmento.ktp.

avangardo = vanguardia, el frente = taĉmento, kiu esploras la terenon antaŭe de iranta armeo.

avanulo = tiu, kiu en futbalo apartenas al la atakanta linio en aliaj sportoj (rugbeo, hokeo, naĝpilko, ktp.), kiu pozicias kutime plej proksime de la kontraŭa teamo.

avangardo = aro da homoj, kiu staras je la pinto de la evoluo (<ili prezentas

la avangardon de la kinoarto> <avangardaj pentristoj>)

ariergardo = retaguardia

ariero # avano (Futbalo: arierulo # avanulo) ariergardo # avangardo

mezkampulo = medio

golulo = guardameta

arierulo = defenza

halfo = medio (meza ludanto)

avanulo = delantero

ludgvidanto = arbitro

ludgvidisto = arbitro

Lingvaĵo:

kiki = ŝoti (chutar) (piedbati en futbalan pilkon; fortege ĵeti la pilkon per piedbato; frapi la pilkon cele al la golejo aŭ alia teamo),

la amfitriono = teamo kiu ludas en sia propra kampo.

dribli = driblar, (movimiento de piernas para superar a un contrario, sobrepasándolo).

ofsajdo = posición adelantada

duobla pasigo aŭ duobla transludo = doble pase

obstruco = obstrucción

(man)enĵeto = saque de banda

Malludo = juego sucio

elpilko = pelota fuera del campo.

faŭli = cometer una falta

ŝoti, kiki = chutar

defenda muro = barrera

punŝoto = tiro por falta cometida

anguŝoto, angulkiko = tiro de esquina, córner

liberŝoto = tiro

kapopuŝo, kapofrapo = tiro de cabeza

golo = gol

golisto = goleador

punŝoto, aŭ punkto-ŝoto, 11 metra ŝoto = penalty

EKSKLUDOJ:

ruĝa (pun)karto

flava (pun)karto

zeloto = fanático, entusiasta

Ĉampionado = campeonato

Ĉampiono = campeón

Monda Futbalpokalo

LUDISTOJ DIVIDIĜAS LAŬ PLURAJ ROLOJ:

1) Defenda linio (arieroj): ili ĉiuj estas ariuloj kaj konsitas en la golulo, la centra arierulo, eksteraj arieruloj, kaj alia liberulo, kiel helpanto laŭ modernaj taktikoj.

2) Meza linio (mezuloj, halfoj): dekstra kaj maldekstra, kaj se necese centra mezulo.

3) Atakanta linio (avanuloj): alo = ekstrema avanulo; centrulo = centra avanulo; kaj mezalo dekstra aŭ maldekstra (interior derecho o izquierdo)

4) Vicludisto = rezerva ludisto

5) Trejnisto = entrenador o director técnico

6) Kapitano aŭ teamestro = capitán del equipo

7) futbaljuĝisto, arbitracianto, ludgvidisto, ludgvidanto = árbitro.

8) linijuĝisto = juez de línea

LA LUDKAMPO AŬ FUTBALEJO AŬ PIEDPILKEJO

golejo = portería

gollinio = toda la línea de gol hasta los ángulos de córner

golejreto

golejfoŝto = poste

trabo aŭ kvertrabo = travesaño

angulflago

golejareo = área pequeña

punareo = área grande

punpunkto = punto de penalty

duoncirklo

flanklinio = lado o banda lateral del campo

mezolinio =

meza cirklo

centra punkto

VESTAĴOJ

ĵerzo = camiseta

(futbal)ŝorto = pantalón

(futbal)ŝtrumpo = media

(futbal)ŝuo = bota

ŝulaĉoj = cordones

tibiŝirmilo = canillera

kruŝirmilo kun maleoŝirmilo = pienera con tobillera

golula ganto = guante de arquero

faifilo = pito del árbitro.

flageto de linijuĝisto = banderín del juez de línea.

Jeeeeees!

Neeeeeee!

Gooooooooo!



La 22-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo, Salou 4 -11.10.2014

Raportas: Liba Gabalda

Komence de oktobro la urbo Salou situanta proksime de Tarragono en Hispanio gastigis la kvaran fojon Internacian E-Semajnon. Jam de kelkaj jaroj la nombro de ĝiaj partoprenantoj superas 140. Ĉi-foje ili venis el dekdu landoj. Alloga loko ĉe la maro altiras geesperantistojn por komuna unusemajna restado en bona etoso. Multaj jam konas unu la alian, sed ĉiam aperas novuloj, kiuj bone integriĝas al la grupo de fideluloj. La plej aĝaj estis la geedza paro el Katalunio: Trini García 97-jaraĝa kaj Joseph Colom baldaŭ 100-jaraĝa! Al ili estis ĉi-jare aljuĝita la premio "Ada Sikorska Fighiera" pro ilia meritplena laboro por Esperanto.

En la solena inaŭguro ĉeestis kaj bonvenigis nin la urbestro de Salou s-ro Pere Granados Carillo. Li prezentis al ni la urbon el la vidpunkto de turismo, substrekis gravecon de Esperanto kaj deziris al ni sukcesplenan restadon kaj fruktodonan laboron. Poste okazis komuna fotado.

Dum la Semajno okazis E-kursoj. Progresantojn gvidis la sperta instruantino Rodica Todor el Rumanio. Ĉi-foje ŝi proponis tre interesan temon: "Esperanto - Ponto inter kulturoj en multlingva, pluretna socio". Ŝi klarigis FLAM-analizon, laŭ kiu ni poste en grupoj diskutis kaj faris konkludojn. FLAM temas pri: Fortoj-Lamaĵoj-Avantaĝoj-Minacoj. Pluraj partoprenantoj en tiuj diskutoj rakontis pri siaj spertoj rilate la instruadon, redaktadon de lokaj bultenoj aŭ organizadon de diversaj aranĝoj kaj staĝoj. Ili dividis siajn sciojn kaj spertojn kun aliaj.

Pri komencantoj okupiĝis Thierry Saladin. Li ankaŭ prezentis prelegon kaj klarigis pri la internacia peticio titolita "Esperanto, oficiala lingvo de Eŭropa Unio Tuj!" iniciata de 16-jaraĝa junulo en februaro 2013. La deziro estas akcepti Esperanton TUJ! Tiucele estis fabrikitaj T-ĉemizoj, kiujn Thierry vendadis dum la aranĝo.

Gian Carlo Fighiera regalis nin per la verko de Alexander Puŝkin "La Neĝoŝtormo" kaj "La Damo de Piko". Fine ni ĝuis la novelon "Palto" de Nikolaj Gogol.

Floreal Gabalda projekciis filmon el Nepalo pri la "Speciala Renkontiĝo", okazinta tie ĉi-jare komence de marto. Ni partoprenis en ĝi. Multaj aprezis la filmon kaj demandoj pri niaj spertoj ne mankis.

Marcel Delforge parolis pri siaj vivspertoj kaj

rakontis pri kelkaj el siaj multnombraj vojaĝoj en Esperantio ilustrante ilin per kelkaj bildoj.

Rafaela Urueña prezentis sian libron "Eŭropo paŝon post paŝo" el jura vidpunkto. Intereso pri kelkaj ekzempleroj kiujn ŝi kunportis estis granda kaj la stoko rapide elĉerpiĝis. János Petik prezentis la temon "La disvastigo de Esperanto", sed antaŭe li parolis pri kelkaj gramatikaĵoj.

Vesperaj programeroj inkluzivis du interkonatiĝojn. María Ferigle Danti prezentis per DVD operon "IL TROVATORE". Ŝia edzo Luis Serrano Pérez animis du vesperajn debatojn: "Kiun influon havas nia movado en la socio?" kaj "Ĉu la Semajno bone funkciis?". Oni povas diri, ke "jes" malgraŭ kelkaj malglataĵoj. Luis ĉefe okupiĝis pri libroservo. Je dispono de la partoprenantoj estis ankaŭ fotoalbumoj. La ĉeestantoj povis trarigardi ilin kaj ekmemori antaŭajn E-Semajnojn kaj aliajn E-eventojn. Unu el la plej atendataj kaj ŝatataj eventoj estas la folkloro vespero kun la ensemblo *Montjuic*, kiu ĉiam regalis nin per belaj havanaj kantoj instigaj al dancado. Tiuokaze ne mankas *Cremat* - bongusta trinkaĵo el bruligita rumo kun aldonaj spicaĵoj.

Okazis unu tuttaga kaj du duontagaj ekskursoj. Pri la gvidado zorgis Rosa López kaj Antonio Martínez. Ni vizitis groton de Maravelles. Kuriozaĵo en tiu groto estas, ke el la plafono pendas kelkaj kalkaj formaĵoj kreskantaj ĉiudirekten. Partoprenantoj de la alia duontaga ekskurso vizitis la urbon Tarragono. Kelkaj profitis belan veteron por refreŝiĝo en la hotela naĝejo aŭ en la maro, aliaj promenis tra la urbo Salou, iuj vizitis la amuzparkon "Bona Aventuro". Grupeto de piedirantoj promenis ĝis novkonstruita lumturo situanta ne tro malproksime de la *Cap Best Hotel*, en kiu ni loĝis. Survoje al ĝi Antoni Comellas atentigis nin pri kelkaj botanikaj plantoj kaj kompetente informis pri ili. La tuttaga ekskurso gvidis nin al la urbo Amposta, kie ni enŝipiĝis kaj navigis sur la rivero Ebro ĝis la maro.

Koran dankon al la katalunaj samideanoj pro ilia fervora laboro kaj okazigo de tiu-ĉi plaĉa aŭtuna evento al kiu ni jam sopiras venontjare.

Liba Gabalda





La 22-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo Liba Gabalda



2014



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda



La 99a Universala Kongreso de Esperanto

Raportas: Ricardo Coutinho

La 99-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Bonaero, belega ĉefurbo de Argentino, partoprenis la vic-ministeriestro pri kulturo de la provinco de Bonaero, ataŝeo de la Ambasadorejo de Svisujo, inter aliaj eminentuloj.

Ĉu la nepoj nin benos? Streboj al daŭripova estonteco estis la kongresa temo. Daŭripoveco estas la plej grava defio de la nuntempo, kiel ŝpari la limigitajn rimedojn ekzistantajn en la planedo, okazis kvar podiaj diskutoj pri tiu grava temo.

Okazis prelegoj de diversaj aferoj: Acidigo de la Oceanoj, pri Argentino, ILEI, Kulturaj Travivaĵoj, Muzaiko, pri filozofio, edukado.net, KER-ekzamenoj, paroligaj kursoj, oratora konkurso, esperantologia konferenco, prelegoj pri AMO, *Esperanto Foundation*, pri medicino, koncerto de Manuel, Koncerto de Nico Aloiso, koncerto de Supernova, danco araba, eĉ futbalmatĉo.

El 99 Congreso Universal de Esperanto ocurrió en Buenos Aires, la hermosa ciudad de Argentina, participaron el vicepresidente de cultura de la provincia de Buenos Aires, el agregado de la Embajada de Suiza, participaron además 706 esperantistas de 57 países.

¿Nuestros nietos nos bendecirán? Esfuerzos para un futuro sustentable fue el tema principal del congreso. Ciertamente desarrollo sustentable es el desafío más grande de nuestra época, cómo ahorrar los recursos existentes en el planeta, fueron cuatro discusiones para dicho tema.

Hubo charlas de diversa índole: Acidificación de los Océanos, sobre Argentina, sobre profesores esperantistas (ILEI), Vivencias Culturales, Muzaiko (radio en esperanto), sobre filosofía, edukado.net, exámenes KER, curso para hablar, concursos de oratoria, esperantología, charlas sobre AMO (sistema de charlas y cursos de capacitación diversos para las comunidades esperantohablantes), Esperanto Foundation, sobre medicina, conciertos de Manuel, Nico Aloiso y Supernova, danza árabe, y hasta fútbol entre esperantistas y comunidad armenia en Argentina.




Mark Fettes, Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio

Solena Inaŭguro





La 99-a Universala Kongreso de Esperanto Ricardo Coutinho



Partoprenantoj salutas al UK
nome de siaj landoj.

Venezuelo estas la antaŭlasta.

Movada Foiro



Kiel mastrumi sian tempon: brila prelego de Dalia Pileckiené per kiu ŝi donas kelkajn konsilojn por fari elementajn projektojn; oni devas precizigi celojn, rimedojn, manierojn, profitojn.

Cómo administrar nuestro tiempo: seminario de Dalia Pileckiené donde muestra varios consejos para volver exitosos nuestros proyectos.



La 99-a Universala Kongreso de Esperanto Ricardo Coutinho



Venezuelaj geesperantistoj sur la strato Venezuelo.

Esperantistas venezolanos en la calle Venezuela.

Andrea Araque, Ricardo Coutinho, Isaac Santiago y Lenin Ramírez.




Kulturaj travivaĵoj: prelego kaj ludoj farita de Mirejo Grosjean. Kie per ludoj la instruistino montras ke ekzistas pli da similecoj inter ĉiuj popoloj kaj malsimilecoj kiujn oni devas akcepti.

Vivencias Culturales fue un cúmulo de juegos didácticos en que la profesora Mireja Grosjean muestra las similitudes entre pueblos y las diferencias que debemos respetar.



La 99-a Universala Kongreso de Esperanto Ricardo Coutinho



Mark Fettes gvidas kunvenon pri Amerika Komisiono.

Amerika Komisiono es una sección de la Asociación Universal de Esperanto para organizar y fomentar la enseñanza del idioma y las relaciones entre esperantohablantes.



Stefan MacGuill parolante pri AMO (Aktivula Maturiĝo).

AMO es un programa de seminarios que se dan en los cinco continentes aprovechando alguna actividad o evento esperantista para capacitar a los mismos sobre. Educación, propaganda, organización.



La 99-a Universala Kongreso de Esperanto Ricardo Coutinho




Kovats kaj Mark Fettes parolas pri Edukado.net

Edukado.net es una página especializada de educadores de esperanto y sitio para compartir materiales e información sobre la enseñanza de esperanto.




Katalin Kovats parolas pri la strukturo, celoj kaj strategio de KER-ekzameno.

Katalin Kovats, nos habla sobre la estructura, objetivos y logística para la ejecución de exámenes de esperanto bajo las normas de la Unión Europea para idiomas.



Wikipedia teamo parolas pri sia laboro en tiu fama reta enciklopedio.

El Equipo de Wikipedia en esperanto habla de su trabajo.



Profesoro Rafael Raola parolas pri la acidigo de la maro kaj ĝiaj konsekvencoj en la vivo en la Tero.

Profesor Rafael Raola dicta una charla sobre la acidificación del mar y sus consecuencias en la vida de la Tierra.



La 99-a Universala Kongreso de Esperanto Ricardo Coutinho




Nacia Vespero en la Teatro Metropolitan.


Nacia Vespero es un evento realizado en el Congreso que presenta las manifestaciones culturales folklóricas del país anfitrión.



Araba Danco



Internacia Vespero



La 99-a Universala Kongreso de Esperanto Ricardo Coutinho



Movada Foiro: aranĝo kie ĉiu organizaĵo montras sian laboron.
En *Movada Foiro* las organizaciones muestran sus proyectos.



Libroservo
Venta de libros en el congreso



Alexander Dumian, kubano, Liba Gabalda, Ĉekino kaj Ricardo Coutinho, venezuelano.





La 99-a Universala Kongreso de Esperanto Ricardo Coutinho



Movada Foiro: aranĝo kie ĉiu organizaĵo montras sian laboron.

En *Movada Foiro* las organizaciones muestran sus proyectos.



La 99-a Universala Kongreso de Esperanto Ricardo Coutinho



Dancejo ene de la Universala Kongreso Baile en el Congreso Universal de Esperanto



Solena Fermo de la 99-a Universala Kongreso de Esperanto.

Cierre Solemne del 99 Congreso Universal de Esperanto.



Cierre Solemne del 99 Congreso Universal de Esperanto y presentación del logotipo del próximo congreso en Lille (Francia).





La 99a Universala Kongreso de Esperanto (26.7. - 2.8. 2014)

Raportas: Liba Gabalda

La 99-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Argentino. Ĝi estas la dua plej granda ŝtato de Suda Ameriko. Ĝiaj najbaraj landoj estas Ĉilio, Bolivio, Paragvajo, Brazilo kaj Urugvajo. Oriente ĝiajn bordojn banas Atlantika Oceano. La ĉefurbo Bonaero havas humidan subtropikan klimaton. La lando havas pli ol 40 milionojn da loĝantoj. En Bonaero vivas 3 milionoj da ili, sed kun la ĉirkaŭaĵo ĝi atingas preskaŭ 13 milionojn da enloĝantoj. Ĝi estas ĥaosa urbego pulsanta tage kaj nokte. Kiel en ĉiu grandega urbo la loĝantaro ne facile vivas tie. Meze de bruega amaso regas malsekureco. Malbono okazis al pluraj esperantistoj. Ili estis priŝtelitaj kaj eĉ per armilminaco iu estis devigata fordoni siajn valoraĵojn.

Argentino unuafoje gastigis la UK-on, al kiu enskribiĝis 706 geesperantistoj el 57 landoj. La evento plej parte okazis en la urbocentro de Bonaero en la hotelo Panamericano, proksime al Obelisko. Malfermo, fermo kaj ĉiuj vesperaj kulturaj programoj okazis en Teatro Metropolitan. Kiel kutime sabate vespere okazis la tradicia Movada Foiro, kie diversaj esperantistaj organizoj kaj asocioj informis pri sia ekzisto, prezentis siajn estontajn aranĝojn kaj varbis novajn anojn.

Dimanĉe la 27-an de julio inaŭguriĝis la 99-a UK per festparolado de la prezidanto de UEA Mark Fettes. La ceremonion ĉeestis ankaŭ kelkaj honoraj gastoj kaj ambasadoroj. Speciala gasto estis Roselyne Dewilde, praparencino de L.L. Zamenhof loĝanta en Argentino. Salutparolis subsekretario de la urba ministerio pri edukado, la prezidanto de LKK Jorge Cabrera, estis legita la mesaĝo de L.C. Zaleski Zamenhof. Poste salutis la kongreson reprezentantoj de partoprenantaj landoj. Ĉe la fino estis kantata E-himno kaj post tio la kongreso estis malfermita.

La ĉeftemo de la kongreso estis: Ĉu la nepoj nin benos? Streboj al daŭripova estonteco. Ĝi estis amplekse pritraktata en grandnombre ĉeestataj prelegoj kaj diskutoj. La bunta semajna programo havis kunvenojn de esperantistaj medicinistoj, komercistoj, sciencistoj, instruistoj, kristanoj kaj aliaj religioj, nefumantoj, blinduloj, SAT-anoj kaj aliaj asocioj. Okazis kurso pri la hispana lingvo, pri tango-danco, pri kaligrafio kaj pluraj prelegoj pri Argentino. Gejunuloj havis sian programon. Tre aprezataj kaj frekventataj estis paroligaj lecionoj gvidataj de Katalin Kovats kaj Sylvain Lelarge. Ili en amuza formo prezentis kursojn por komencantoj kaj spertigis progresantojn. Estis ebleco partopreni en KER-ekzamenoj al kiuj kandidatiĝis 30 personoj.

Esperantlingvaj aŭtoroj prezentis siajn verkojn dum la aŭtoraj duonhoroj en la libroservo.

La nova estraro sub la gvido de la vigla kaj entuziasma prezidanto Mark Fettes alportis plurajn ŝanĝojn al la kongresa programo. La tagoj de la semajno ricevis novajn nomojn bazitaj laŭ ĉefaj punktoj de la laborplano: lundo estis Tago de konsciigo, Tago de lernejo estiĝis Tago de kapablo, ĵaŭdo estis Tago de komunumo kaj vendredo Tago de kunordigo.

Same kiel lastjare en Rejkjaviko, ankaŭ ĉi-jare okazis la 27-an de julio posttagmeze la Ĉina Tago en apuda hotelo Colon. Oni povis admiri belegan foto-ekspozicion pri Pekino, ekscii pri la Esperanto-muzeo kaj pri Esperanto-movado en Azio. La ĝenerala direktoro de UEA Osmo Buller ricevis de ĉinaj reprezentantoj Premion de kontribuo al Esperanto-Amikeco kaj la dokumentan filmon Longa Rivero.

Nova elemento eniris la kongreson. Kelkaj sportemuloj ĝuis historian futbalmatĉon inter esperantista teamo formita surloke kontraŭ armen-devena teamo. La entuziasmo estis granda malgraŭ tio, ke esperantistoj malgajnis. Eble tiu sperto fariĝos nova kongresa tradicio. Tamen mankis alternativa programo por nesportemuloj. Bedaŭrinde oni ne pensis pri vespera tango-spektaklo. En la urbo tiuj abundis.

Efektive, en la kongresa programo estis io por ĉiu. Multaj kongresanoj profitis urbajn ekskursojn por malkovri ties belaĵojn kaj historiaĵojn. Per duetaĝa turisma buso eblis trairi la urbon kaj dum pli ol tri horoj admiri multajn interesajn vidindaĵojn. En la urbo troviĝas multaj muzeoj, galerioj, parkoj, ripozejoj. Tute speciala estas la kvartalo "La Boca" kun interesa arkitekturo kaj la fama buntkolora pentrita strato "Caminito". Unu semajno ne sufiĉas por vidi ĉion vidindan kaj ĝui ĉion ĝuindan en tiu-ĉi urbego. Tamen oni povas diri, ke la kongreso estis kontentiga, eĉ se malgranda. Ĉu la homoj rezignis la kongreson pro longa distanco, ĉu pro tro alta kosto, ĉu pro vintra sezono en Argentino, ĉu pro ŝparo por povi partopreni la jubilean 100-an kongreson en Lillo? La plej multaj kongresantoj venis el Brazilo, Japanio kaj Francio. Bonŝance partoprenis pluraj junaj sudamerikanoj. Por iuj ĝi estis la unua kongreso. Ili estis tre kontentaj kaj entuziasmaj pri tiu sperto. Partoprenantoj ĝuis la urbon, ekskursojn, manĝojn kaj pasigis la tempon kun novaj kaj malnovaj geamikoj. Laŭ la lastjara kutimo la estraranoj post la fino de la kongreso adiaŭis la partoprenantojn per manpremo.

Liba Gabalda



La 99-a Universala Kongreso de Esperanto Liba Gabalda



Fotis kaj arangis Liba kaj Floreal Gabalda



La 47-a ILEI-Konferenco en Montevideo (19a - 25a julio 2014)

Raportas: Liba Gabalda

Antaŭ la Universala Kongreso en Argentino okazis en la urugvaja ĉefurbo Montevideo la 47-a ILEI-konferenco. La eventon ĉeestis 75 geesperantistoj el 26 landoj. ILEI-konferencoj kutime komenciĝas per franda vespero. Ĉiu partoprenanto alportas ion el sia lando por gustumigi la aliajn. Kolektiĝis multe da frandaĵoj kaj interbabilante la homoj konatiĝis.

La solena inaŭguro okazis en impona konstruaĵo de la Nacia Parlamentejo. Al la inaŭguro ĉeestis la urbestriino s-ino Ana Olivera kaj du reprezentantinoj de la regiona oficejo de Unesko en Montevideo, inter kiuj estis la direktorino s-ino Lidia Brito. La ĉeestantojn bonvenigis s-ino Mireille Grosjean el Svislando la prezidantino de ILEI. Ankaŭ la urbestriino kore bonvenigis nin kaj deziris al ni sukcesan laboron. Same bonvenigajn vortojn direktis al ni la direktorino de la Unesko-oficejo. Poste parolis la vicprezidanto de UEA Stefan MacGill kaj sekvis du mallongaj prelegoj rilataj al eventoj antaŭ 60 jaroj. En la sama loko la ĝenerala konferenco de Unesco aprobis la unuan rezolucion favoran al Esperanto en la jaro 1954. Por ni tio estis vere grandioza kaj digna evento povi esti en tiu tiom signifoplena historia loko dank' al la klopodoj kaj sukceso de lokaj esperantistoj sub gvido de Sonia Risso. Poste ni havis eblecon viziti sub gvidado la parlamentejon kaj kunvenejojn de deputitoj kaj senatanoj. Impresis la ampleksa biblioteko. Forlasinte la parlamentejon ni en apudeco sur herbejo plantis gujavan arbeton. Ĉiu aldonis al ĝi iom da tero aŭ akvumis ĝin. Apud ĝi estis malvaluita memortabulo kun la jena teksto: Esperanto - Unesko, 60 jarojn kune 1954-2014.

La konferencaj prelegoj okazis en Ateneo ĉe la placo "Cagancha". Sur ŝtofo estis prezentita la markemblemo de ILEI. S-ro Alberto Baroccas ricevis de urugvajaj esperantistoj enkadrigitan diplomon pro sia 60-jara laboro por Esperanto. La konferencanoj eksciis pri instruado laŭ Tinĉjo-libro, oni parolis pri nuntempaj tendencoj en la lingvoinstruado kun aparta atento al la rolo de teknologio, pri kultura komunikado, pri la projekto "Ceibal" - havigo de malgrandaj komputiloj por ĉiuj lernejoj por plifaciligi la lernadon ankaŭ por gepatroj, pri afrika influo en muziko kaj kulturo.

La komitato de ILEI elektis du novajn honorajn membrojn - la forpasintan profesoron Helmar Frank kaj s-ron Rob Moerbeek, kiu ĉeestis la konferencon. Krome estis elektitaj kvar novaj landaj sekcioj en Irano, Hispanio, la Demokratia Respubliko Kongo kaj Bulgario. Oni decidis aperigi la revuon Juna Amiko kvarfoje jare.

La konferencon partoprenis ankaŭ la

prezidanto de UEA Mark Fettes. La simpozio en Montevideo esploris lingvan justecon en praktiko. Okazis serio da interesaj prelegoj: pri indiĝenaj popoloj, pri dulingveco, Esperanto kaj medicino, lingva justeco en Eŭropo kaj multlingveco en Eŭropa Unio, Rob Moerbeek dum la paŭzo animis erarologion kaj la simpozio finiĝis per prezento de rektmetoda kurso en interreto Saluton!

Dum la nacia vespero ni ekkonis la historion de Ĉarua etno kaj spektis prezenton de folkloro danco, kantojn prezentitajn de infanoj kaj ne mankis tangoprezento. Ankaŭ niaj talentuloj kontribuis al la posta internacia vespero kaj prezentis dancojn, spritaĵojn, deklamis poemojn, gitar- kaj pianludis, kantis. Bonega estis la bankedo en la restoracio "El Fogón" en akompano de muzika duopo. Per duetaĝa turisma buso ni trairis la urbon kun surbendigataj esperantoklarigoj ĉe ĉiu interesa punkto.

Malgraŭ la pluva vetero ni ĝuis belan ekskurson al "Punta del Este". Tie ni admiris marvirinetojn, fingrojn elstarantajn el sablo (monumento fare de ĉiliano Mario Irarrázabal), kie ni fotiĝis man-en-mane. Tre interesa konstruaĵo "Casapueblo" situanta en "Punta Ballena" estas muzeo de Carlos Páez Villaró. Tie oni povas admiri liajn artaĵojn.

Atenton elvokis multaj homoj promenataj surstrate kun termoboteloj, mateujoj kun suĉiloj kaj ĉiumomente trinkantaj la mateon. Ĝi estas la plej populara nacia trinkaĵo en Urugvajo. Oni ankaŭ povis spekti vesperajn tango-dancantojn apud la ĉefstrato. Ĉiu, kiu deziris kaj scipovis havis eblecon enviciĝi kaj kundanci.

Tre interesa estis lingva festivalo antaŭ la Ateneo ĉe frekventata strato. Ni prezentis 16 lingvojn kaj disdonis varbilojn pri Esperanto. Kelkaj preterpasantoj kaptis okazon kaj scivoleme sekvis duonhorajn lecionojn. Plej grandan atenton vekis la japana kaj nepala lingvoj.

Vendrede la plejmulto de konferencanoj karavane busveturis al "Colonia de Sacramento", kie ili vizitis pitoreskan urbeton enskribitan en la listo de mondaj heredaĵoj de Unesko kaj poste daŭrigis per ŝipo al Bonaero. Dum la semajno ni havis buntan programon kaj ĉiuj bone amikiĝis kaj amuziĝis dum la paŭzoj. Koran dankon al urugvajaj samideanoj, kiuj strebis al bona disvolviĝo de la konferenco en tiu-ĉi signifoplena jubilea jaro inter Esperanto kaj Unesko pro la 60-a jariĝo de la unua Rezolucio. Moralan subtenon al la konferenco esprimis ankaŭ la urugvaja prezidento Don José Mujica.

Liba Gabalda



La 47-a ILEI-Konferenco en Montevideo Liba Gabalda



47^a Internacia Konferenco de Esperantistaj Instruistoj

Lingva justeco, spertoj kaj tendencoj

ESPERANTO UNESCO

Jaroj kune

Internacia Linvo
esperanto
esperanto
esperanto

EN ATENEO DE MONTEVIDEO
De la 20a ĝis 25a de julio

La Registaro Deklaris ĝin de Nacia Intereso

mec

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj - Esperanta Urugvaja Societo
www.ilei.org.uy



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda



Tibor Sekelj: Pri orkideoj



“Orkideo” estas magia vorto en la tuta mondo. En la salonoj ĝi signifas plejan distingitecon, kiel donaco, la plej delikatan atentemon, en la florvendejoj prezojn plej altajn. Ĝia nomo estas universala. Nur la portugala faras escepton. “Parásita” oni ĝin nomas simple. Kaj kiam oni aŭdas tiun nomon el la buŝo de loĝanto de Matogroso, la fabela planto perdas sian tutan ĉarmon, reduktiĝinte al simpla parazito, kiu kreskas kroĉita al la trunkoj kaj branĉoj de la arboj, donante, iam kaj tiam, florojn violkolorajn, blankajn aŭ flavajn, nek pli nek malpli belajn ol la plantoj ceteraj.

Tiom pli mirinda prezentiĝas antaŭ la okuloj de la vizitanto de tiu regiono la unua orkideo, kiun li sukcesis mallevi de sur arbo: ĝiaj violkoloraj folioj etendiĝas kviete, dum la centro de la floro similas skulptaĵon elpensitan de frenezulo; ĝia parfumo elradias ebriigan

dolĉon, rememorigante tempojn romantikajn. Li komparas tiun admirindan kreaĵon kun la orkideo de urba florvendejo, enkorpigita al florvazo kaj sen iaodoro, perceptante distancon egan inter ambaŭ fratinoj. La mirinda naturo plenigas liajn okulojn, pulmojn, kaj la koro batas furioze. Jen la momento, kiam la homo forgesas siajn brakojn, sangantajn pro arbdornoj, sian laciĝon, kaŭzitan de la fortostreĉo, kaj la pantalonon disŝiritan. Kaj jen estas ankaŭ la momento, kiam --se li havas fibron de aventuremo-- li fariĝas orkideĉasanto. ”

El la libro *Tra Lando de Indianoj*,
de Tibor Sekelj. paĝoj 34-35.
Eldona Societo Esperanto, Svedlando.

Foto: Orkideo fotita de Ramón Morales Castel la 15an de decembro 2014 en la nordorienta venezuela urbo Cumaná.

FORPASOJ

Johano Negrete (hispane Juan José Guillermo Negrete García) naskiĝis en la urbo La Laguno, Tenerife, hispana insularo, (1^a de februaro 1943). Lia patro fuĝis de Hispanujo pro la Civila Milito ĉar li estis favora al la republiko. Poste alvenis al Venezuelo la tuta familio, laŭ la leĝo, por la venezuelaniĝo de lia patro, li mem iĝis venezuelano.

Li lernis filozofion en la Centra Universitato de Venezuelo, dum sia studo li ankaŭ ludis futbalon, sufiĉe bone por eniri al la profesia kategorio sed li decidis investi sian tempon por fini sian karieron.

Li mem lernis esperanton post sia emeritiĝo kiel profesoro de la Lernejo de Filozofio de la Centra Universitato, li konis esperanton tri foje: unue kiam li partoprenis en Kongreso pri Latinoameriko post la Vietnam Milito, li rigardis libron titolita La Monda Lingvo-Problemo. Poste dum la jaro 1992 en la urbo La Laguno li aŭskultis homojn parolante strangan lingvon kaj demandis kiu lingvo estas, fakte estis esperanton, li estis invitita al klubo kaj aĉetis lernolibron kaj vortaron. Reveninte al Karakaso li kontaktis al Venezuela Esperanto-Asocio.

Ekde tiam, li instruis esperanton en la Lernejo de Filozofio en la Centra Universitato, en la Universitato Metropolitana kaj en la Instituto Pedagogia de Karakaso kaj en la landa asocio. Kun apogo de la Instituto Pedagogia de Karakaso li kreis la bultenon Lingvo & Lingva Komunikado, ĝi estis diversotema kaj preskaŭ ĉio en la hispana, kun klarigoj de la gramatiko de esperanto kaj kelkaj novaĵoj de la esperantista movado.

Li kaj sia edzino, Silvana Messori, estis gravaj por la organizado de la Kolombia-Venezuela Rekontiĝo en Karakaso (2002), en la Instituto Pedagogia de Karakaso.



Negrete estis prezidanto de la Kultura Esperanto-Fondaĵo, sed post multaj obstakloj por labori en tiu organizo li decidis eksprezidantiĝi. Li kun kelkaj lernantoj kaj asocioj de VEA kreis la Kooperativan Esperanto-Amikaro15, ĝi celis krei monrimedojn por subteni la esperantistan agadon. Okazis kelkaj problemoj sufiĉe gravaj en la landa asocio tial preskaŭ ĉiuj decidis dediĉi sian libertempon por plifortigi ĝin. Nur Negrete daŭre verkis por la kooperativo per sia oficiala retejo www.esperanto-amikaro.org.ve ĝis sia morto.

Li ankaŭ estis prezidanto de Venezuela Esperanto-Asocio post la morto de Jorge Mosonyi (2009) ĝis la fino de 2013.

Negrete verkis por diversaj esperantistaj revuoj, inter ili: Literatura Foiro, Femine kaj Venezuela Stelo. Estis intervjujita de la ĵurnalo El Universal, Radio Unión, Radio 23 de Enero. Li ankaŭ verkis pri esperanto en naciaj revuoj.

Li mortis en Karakaso, en sia hejmo, 14 de novembro 2014.

Forpasis la inĝeniero Felix García Blásquez

La samideano Andrés Turrissi informis per malgranda interreta mesaĝo la forpason de la honora membro de nia landa asocio.

"Post pluraj kaj plurmanataj klopodoj, fine mi sukcesis komunikiĝi kun la telefonnumero de Inĝ. García. Respondis iu fraŭlino nekonata, kiu informis min ke antaŭ unu jaro ŝia familio aĉetis la loĝejon kie loĝis gesinjoroj García. Ŝi ankaŭ diris ke Inĝ. García forpasis, kvankam ne povis aserti tion tute certe. Ŝi

scias nenion pri S-rino García. Mi scias ke ili ne havis familianojn en Karakas, sed S-rino Alicia ankoraŭ havas kuzojn en Honduraso."

La inĝ. García estis membro de nia organizaĵo ekde ĝia refondiĝo je novembro 1975 ĝis sia forpaso. Li estis la unua redaktisto de Venezuela Stelo, verkis fakan vortaron por inĝenierado, verkis ankaŭ libron pri Tratado pri vortfarado, kaj Curso Elemental y Avanzado de Esperanto.



Pino D'Angiò: La pluvombrelo El la itala esperantigis: Andrés Turrisi

Ĉu eblas la enir'? Pardonu min.
 Ĉu mi povas eniri? Bonan tagon!
 Pardonu... mi bezonas pluvombrelon. Kaj...mi fajfas pri l'
 elspezo.
 Mi ĝin bezonas, kreu... Estas urĝe.
 Al mi pluvas interne. Malgraŭ vetero plaĉa.
 Kaj tio tute gravas al neniu.
 Al mi pluvas interne de l'animo... strange.
 Tamen ne diru "Havas ni neniun"
 La ŝildo de l' vendejo allogis min,
 ĝi diras ke vi estas specialisto.
 Ĝi diras "Pluvombreloj ekde 1937"
 Mi nun ne volus streĉi vin, sed se la firm' fidindas
 kaj prave, vi min ne povas tiel elrevigi...
 Do, pli bone mi klarigas, aŭdu min,
 mi volas kapabligi vin kompreni
 tiel ke vi sugestu al mi modelon:
 sendube trovos vi taŭgan ombrelon.
 Vidu... pluvas de longe en mia interno.
 Ne, ne temas pri plafono-fendo,
 mi jam kontrolis, jes... sed tute vane.
 Paroli lasu min, restu silenta.
 Ĝuste ĉi interne pluvas... en la vejnoj...
 Kaj ofte, en la pensoj estas ŝtormo.
 Mi volus ion taŭgan por min ŝirmi
 kaj levi al mi iomete la spiriton.
 Kiam mi pensas pri mi mem infano
 al mi pluvas interne.
 Ankaŭ ĉar tio foras, kaj...
 Mi sentas eĉ malvarmon en la koro
 kaj mi troviĝas... jes, tute trempita.
 Pluv' en la memoroj... ilin forviŝas,
 ilin forportas... ili konfuziĝas.
 Eble devintus mi ilin protekti,
 sed estas mi senorda, ili disis.
 Tiuj de antaŭtempe, tiuj ĵusaj...
 troviĝis en la mez' de ĉiuj sentoj
 tie kaj tie dise laŭ la vivo.
 Reĝis konfuzego...
 Pripensu plu, pripensu iomete.
 Vi eble al mi trovas pluvombrelon,
 elektu vi l' koloron, vi la formon.
 Mi diris jam ke al mi ne gravas spezo:
 iru al la staplo, afabla, en ĝi rigardu!
 Ekzemple, jen... min batas pluva forto
 kiam mi pensas pri amitu! kaj lia morto.
 Kiu alivorte nun jam ne estas plu!
 Se sciis vi kiom da akvo falas!
 Ĉu ion havas vi por doni al mi ŝirmejon?
 Mi pagos kiom ajn, kompreneble.
 Kelkfoje okazas vera uragano
 kaj restas mi senmova sub la ŝtormo.
 Kun brak' levita, kaj aperta mano,
 foje mi vidas l' akvon kuri inter la fingroj...
 Klopodu trovi ion por defendi
 kontraŭ la hororaj ŝtormoj de la vivo!
 Poste... pluvetoj nedireble tedaj,
 kiuj ne ŝajnas trempi, tamen male
 eniras en la ostojn malrapide
 kaj al vi algluiĝas kvazaŭ peĉo.

La pluvoj estigitaj de la homoj aŭ eble...
 ĉu estigitaj de mi mem,
 kiu volintus esti pli bona kaj male fine...
 rigardu min, mi estas sama.
 Kaj kiaj akvoplaŭdoj!... plaŭdoj tujaj
 eniras sur la kolon kaj la ŝultrojn.
 Kredeble estigas ilin ... ia amo,
 ia memoro vana... kia ĝeno!
 Ĉu havas vi iun memor-ombrelon?
 Ĉu ombrelon kontraŭ la malgajo? Fine,
 ĉu diros vi al mi... kion vi vendas?
 Ne gravas ĉu nilona aŭ ĉifona...
 Do, serĉu ĝin, meze de la bretaro!
 Mi ombrelon volas kontraŭ malbonaro!
 ... Al mi pluvas interne... komprenite?
 Antaŭen, do! Necesas koncentriĝo!
 Pensu pri la modeloj ne plu produktataj,
 pri tiuj man-faritaj... la japanaj,
 aŭ... serĉu inter tiuj, la alkroĉitaj!
 Tiuj por inoj? Ili same taŭgas!
 Ne pensu ke al mi gravas la modelo,
 min ne rigardu tiel, ne agu stulte...
 Antaŭen... trovu al mi la pluvombrelon!
 Se sciis vi pri l' pluv' en la spegulo
 ĉe l' ekkonsci' pri l' temp' malŝparigita!
 Kaj foje mi bezonas eĉ sitelon
 tamen la planko dume... inundiĝis.
 En certaj momentoj pluvas ĉie ajn
 kaj dank' al via ombrel' mi restus seka.
 Sed jes! Ĝi taŭgas eĉ se el silka puro...
 kondiĉe ke ĝi ŝirmu de l' teruro.
 Resume, vidu vi, ĉu estas klare?
 Trovinte ĝin, ebligu al mi l' eliron.

Dum mia dirad', li haltigis min subite,
 poste ridetis, malfermis sian jakon...
 tiam... mi vidis... ke al li pluvegas ene...
 ... kun forta bruo, tipa je la surfo.
 Sed li ridetis. Eĉ, tute trankvila,
 kaj estis plentrepita, mi memoras.
 "Al ĉiu estas pluvo, mia kara,
 Al ĉiu estas ŝtormo individua.
 Kiele ĝuste povus mi vin helpi?
 Vidu, ne eblas fuĝi de la ŝtormo.
 Kaj malfacilas resti stare
 en ĉi uragan' kiu venos fru-malfrue.
 La pluv' ne eviteblas,
 Estas necese nur ne teruriĝi.
 Kaj fine, diru kion ĝi signifas!
 Alpaŝu vi antaŭen.
 Ni ĉiuj senescepte estas trempitaj.
 Ridetu. Ridetu, ĉar estas pli bele!
 Iru serene, l' hombrelo senutilas.
 Vi vidos ke valoros ja la peno
 eĉ se vi sentos fridon ĉe la dorso.
 Kuraĝon, ne rezignu, ek, antaŭen!
 Agu.. ne seniluziigu ĉiujn nin.
 Por vi zelotas ni... ĉu vi ne scias?"

Mi ĝuste en tiu momento lin rekonis,
 kaj elirante diris...
 "En ordo, paĉjo"



Directorio de Asociaciones en América

El Movimiento Esperantista (la *Movado*) es muy amplio y diverso. En todo el mundo hay una gran variedad de clubes, organizaciones, asociaciones, editoriales, institutos, etc, dedicados a la difusión y el uso del idioma internacional Esperanto. Reunirlos todos en una lista es una gran tarea. En este directorio te mostramos las páginas oficiales de las principales asociaciones de Esperanto en América. Presta especial atención a las páginas y recursos de asociaciones en países de habla hispana, puesto que podrás aprovechar tu lengua materna (el español), para aprender Esperanto o para participar en los eventos y encuentros en todo el continente. Este directorio está todavía en elaboración e irá creciendo en los siguientes números de esta revista.

ESTADOS UNIDOS

- > Esperanto-USA: <http://www.esperanto-usa.org/>
- > La Esperanto-Societo de Vaŝingtono: <http://www.esperantodc.org/>
- > Esperanto Society of New York: <http://www.esperanto-nyc.org/>
- > Esperantic Studies Foundation: <http://esperantic.org/en/>

CANADÁ

- > Esperanto en Canadá: <http://www.esperanto.ca/>
- > Esperanto-Societo Kebekia: <http://www.esperanto.qc.ca/eo>
- > Boletín La Riverego: <http://www.esperanto.qc.ca/eo/riverego>

CUBA

- > Asociación Cubana de Esperanto: <http://www.esperanto.cult.cu/>
- > Radio Havano Kubo: <http://www.radiohc.cu/eo/>

MÉXICO

- > Federación Mexicana de Esperanto: <http://esperanto-mexico.org/>
- > Revista Ni ĉiuj: <http://esperanto-mexico.org/es/nicxiuj>
- > Asociación Mexicana de Esperanto: http://meksikoesperanto.org/el_esperanto_en_mexico.html

VENEZUELA

- > Asociación Venezolana de Esperanto: <http://www.esperanto-venezuela.org/>
- > Cooperativa Esperanto-Amikaro: <http://esperanto-amikaro.org.ve/ttt/index.php/es/>

COLOMBIA

- > Liga Colombiana de Esperanto: <http://www.ooocities.org/kolombio/>
- > Kolombia Esperanto-Ligo: <http://esperantokalio.blogspot.com/>

BRASIL

- > Brazila Esperanto-Ligo: <http://esperanto.org.br/bel/>
- > Brazila Esperantista Junulara Organizo: <http://bejo.esperanto.org.br/>
- > Esperanto @ Brazilo (portugués): <http://esperanto.brazilo.org/wp2/>
- > Esperanto Ilustrado (portugués): <http://www.esperantoilustrado.blogspot.com.br/>
- > Esperanto Ilustrita (esperanto): <http://www.esperantoilustrita.blogspot.com.br/>
- > Kultura Kooperativo de Esperantistoj: <http://www.kke.org.br/>
- > Esperanto-Asocio de San-Paŭlo: <http://easp.org.br/portal/>

CHILE

- > Asociación Chilena de Esperanto: <http://esperanto.cl/>
- > Juventud Esperantista Chilena: <http://chejo.blogspot.com/>

URUGUAY

- > Urugvaja Esperanto-Societo: <http://www.esperanto.org.uy/>

ARGENTINA

- > Liga Argentina de Esperanto: <http://www.esperanto.org.ar/>
- > Blog de la Liga: <http://argentinaesperantoligo.blogspot.com.ar/>
- > Bonaera Esperanto-Asocio: <http://esperanto-bea.blogspot.com/>



Esperanto: Movimiento Internacional

El Movimiento Esperantista es un movimiento verdaderamente internacional, multicultural, que reúne en un solo esfuerzo muchas culturas, pueblos y naciones, sin discriminación de razas, idiomas, religiones o inclinaciones políticas. Esperanto significa idioma pero también significa cultura internacional, derechos humanos, democracia y justicia social. Todas las asociaciones y hablantes del idioma internacional tienen un centro común, la Asociación Universal de Esperanto, que organiza, entre otras cosas, los Congresos Universales de Esperanto que se llevan a cabo en una ciudad del mundo una vez cada año.

ASOCIACIÓN UNIVERSAL DE ESPERANTO y otras organizaciones esperantistas

Asociación Universal de Esperanto (UEA):
<http://www.uea.org/info/hispana.html>

UEA en Facebook:
<https://www.facebook.com/Universala.Esperanto.Asocio>

Centro multilingüe sobre el Esperanto: <http://esperanto.net/>

Unión Europea de Esperanto: <http://www.europo.eu/eo/chefpagho>

Liga Internacional de Pedagogos Esperantistas:
<http://www.ilei-mondo.info/page.php?pid=65657697>

edukado.net: <http://edukado.net/>

Academia Internacional de las Ciencias San Marino:
<http://www.ais-sanmarino.org/index.html>

Asociación Mundial Anacional: <http://www.satesperanto.org/>

Academia de Esperanto: <http://www.akademio-de-esperanto.org/>

Periódicos y revistas en línea

Revista *Kontakto* (revista juvenil): <http://kontakto.tejo.org/>

Eŭropa Bulteno (Boletín de *Eŭropa Esperanto-Unio*):
<http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

Libera Folio: <http://www.liberafolio.org/>

La Ondo de Esperanto y editorial *Sezonoj*: <http://esperanto.org/Ondo/>

La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Le Monde diplomatique: <http://eo.mondediplo.com/>

La Esperanto-centro EVENTOJ: <http://www.eventoj.hu/>

La Esperanta Gazetejo: <http://www.gazetejo.org/gazetejo>

Ĉina Radio Internacia: <http://esperanto.cri.cn/>

El Popola Ĉinio (Desde la China del Pueblo):
<http://esperanto.china.org.cn/EL/EL/EIPopolaCxinio/>

Monato (actualidad, noticias y opinión): <http://monato.esperanto.be/>

Usona Esperantisto (Esperantista estadounidense):
<http://bulteno.esperanto-usa.org/>

En España

Federación Española de Esperanto:
<http://www.esperanto.es/hef/>

Hispana Esperantista Junulara Societo:
<http://www.esperanto.es/hef/index.php/hejs>

Asociación Catalana de Esperanto:
<http://www.esperanto.cat/web/?lang=ca>

Kataluna Esperanto-Junularo: <http://esperanto.cat/kej/ca>

Kataluna Esperantisto (revista):
<http://www.esperanto.cat/web/Kataluna-Esperantisto?lang=ca>

Arunda Esperanto-klubo:
<http://esperantoarunda.blogspot.com/p/eventos-eventoj.html>

Asociación Andaluza de Esperanto:
<http://andaluciaesperanto.blogspot.com/>

Radios y podcasts

Radio Vatikana (Ciudad Vaticano):
<http://www.radiovaticana.va/esp/index.asp>

Radio Havano Kubo (Cuba): <http://www.radiohc.cu/eo/>

Muzaiko (Internacional): <http://muzaiko.info/>

Peranto (Alemania): <http://members.aon.at/aldone/retradio/>

Pola retradio (Polonia): <http://pola-retradio.org/>

3ZZZ Radio en Esperanto (Australia):
<http://melburno.org.au/3ZZZradio/>

Varsovia Vento (Polonia): <http://www.podkasto.net/>

Editoriales

Eldonejo Impeto: <http://impeto.trovu.com/>

Mondial: <http://sites.google.com/site/librojenesperanto/>

Flandra Esperanto-Ligo: <http://www.esperanto.be/fel/>

Kultura Kooperativo de Esperantistoj: <http://www.kke.org.br/>

Eldona Esperanto-Societo: <http://www.algonet.se/~eldona/>

KAVA-PECH: <http://www.kava-pech.cz/index-esperanto.html>

Libros de la serie *Stafeto* de Juan Régulo Pérez:
<http://www.esperanto.be/fel/but/stafeto.php>



Hazte miembro de nuestra asociación y ayúdanos a continuar nuestra labor...

Como miembro simpatizante de nuestra organización en el 2015 tendrás los siguientes beneficios:

- * Usar nuestra biblioteca.
- * Inscribirte en nuestros cursos de esperanto sin costo.
- * Postularte como delegado.
- * 10% de descuento en nuestra librería.

Todo esto por sólo Bs. 1500,00

Envía fotocopia de tu cédula de identidad y comprobante de depósito a:
venesperanto@cantv.net

También puedes ayudarnos con una donación a nombre de:
Asociación Venezolana de Esperanto (RIF: J-00187027-0)
Banco Banesco, Cuenta Corriente N° 0134-0332-59-3321059219.

¡Todo aporte será profundamente agradecido!



VENEZUELA STELO
Apartado postal 47675, Caracas 1041-A.
Telefonnumero: 58 0212 6629224.
www.esperanto-venezuela.org
venesperanto@cantv.net

